

partoprenantoj estis jam en la preparoj tre limigita. Enkalkulinte ankaŭ la teknikan kaj organizan stabon (14 personoj) kaj dekon da observantoj de gravaj internaciaj organizaĵoj (UNESCO, OECD, CERN ktp.), entute estis ĉirkaŭ 80 partoprenintoj. Inter la observantoj estis ankaŭ la aŭtoro de ĉi-artikolo (nome de Internacia Scienca Asocio Esperantista).

Laborkunsidoj de la konferenco

Dum aliaj tri tagoj oni efektive laboris, ĉar oni havis la kunsidojn antaŭ-kaj posttagmeze.

Laŭ la antaŭvidita programo, estis organizitaj plenkunsidoj kaj la sekciaj kunsidoj (du sekcioj). La unua plenkunsido estis dediĉita al la ĝeneralaj problemoj: Premisoj kaj rimedoj por la internacia kunlaborado (Nobelpremiito **G. F. Powell**, Britujo); Sciencaj kaj teknikaj demandoj de la nuna erao (Nobelpremiito kaj Akademiano **A. M. Proĥorov**, Sovetunio); Respondecigo de sciencaj laboristoj kaj eŭropa kunlaborado (Akademiano **M. Steenbock**, Germ. Dem. Respubliko) kaj Sciencaj aktivecoj de OECD kaj la kunlaborado inter ĝiaj membroj (**J. J. Salomon**, reprezentanto de la Organizaĵo por Ekonomiaj Kooperado kaj Evoluo).

La duan komunan kunsidon plenigis diskutoj pri la rolo de la Eŭropa scienca kunlaborado koncerne la evoluantaj landoj. La enkondukan raporton (Pri planado de la ekonomia evoluo, realigado de la antaŭkondiĉoj kaj sciencaj programoj) donis reprezentanto de UNESKO (**L. Ziéglé**). La diskuton partoprenis ankaŭ observantoj el kelkaj evoluantaj landoj. Precipe interesa estis (kaj fakte sen difinita respondo restis) la demando starigita de d-ro Zaheer (Hindujo): Kiom da tempo bezonus la evoluantaj landoj por atingi la jam evoluitajn (se restos la nuna amplekso de la „helpo” al evoluantaj landoj)?

La unua sekcio havis tri kunsidojn kun la planita temo: La neceso de scienca kunlaborado en Eŭropo kaj la rimedoj por ĝia antaŭenigo. En kadro de ĉi tiu ampleksa temo oni tralegis, aŭ nur koncize raportis la jam dissenditajn, kontribuajn de 28 partoprenantoj. La titoloj estis tre diversaj, sed ili ariĝis — laŭ la antaŭvidita programo — ĉirkaŭ jenaj tri temoj: La nunaj formoj de eŭropa scienca kunlaborado; La antaŭenigado de scienca kunlaborado en Eŭropo (ĝia plilarĝigo de ĉiuj eŭropaj landoj, kreo de tuteŭropaj sciencaj societoj, publi-

kigado de tuteŭropaj sciencaj revuoj kaj kreado de larĝaj sciencaj centroj) kaj Popularigo de la klopodoj pri eŭropa scienca kunlaborado. La laborkunsidojn de la unua sekcio prezidis Prof. **E. H. S. Burhop**, Britujo.

La dua sekcio havis same tri kunsidojn, sub prezidado de Akademiano Prof. **I. I. Artobolevski**, Sovetunio. La komuna ampleksa temo en la dua sekcio estis: La kondiĉoj por scienca kunlaborado en Eŭropo. Sub diversaj titoloj, tie raportis 15 partoprenantoj, pri kvar temoj: Pliboniĝo de la rilatoj inter eŭropaj nacioj (kaj evoluo de sistemo de eŭropa sekureco kiel la baza kondiĉo por la evoluo da scienca kunlaborado); Obstakloj kontraŭ scienca kunlaborado; Aliaj malfacilaĵoj por progreso de sciencoj kaj de scienca kunlaborado en Eŭropo; Respondeco de sciencistoj pri la evoluo de pacaj interrilatoj kaj por scienca kunlaborado malgraŭ la obstakloj.

La lasta kunsido estis komuna, solena, kun partopreno de diversaj urbaj reprezentantoj, ĵurnalistoj, televidistoj ktp. Tie oni donis raportojn pri la laboroj de la konferenco.

La Konferenco vidita de la lingva punkto

Koncerne la lignvajn problemojn, ĉi tiu konferenco donis tute kutiman, jam bone konatan, ekzemplon. Dum la komunaj kunsidoj oni havis similtanan tradukadon en kvar uzatajn lingvojn: angla, franca, germana kaj rusa. La simultana tradukado funkciis sufiĉe kontentige, ĉar oni dungis unuaklasajn tradukistojn kaj oni donis al ili la antaŭe preparitajn tekstojn (kun kelkaj esceptoj, kiam la raportanto parolis sen preparita teksto; tiam la tradukistoj havis pezegan laboron kaj ili ne povis tute flue kaj adekvate sekvi la parolanton). Sed por la sekciaj kunsidoj oni povis disponigi nek la necesan aparataron nek tiom da unuaklasaj tradukistoj. Tie oni parolis en unu el la kvar laborlingvoj (plejparte en la angla); en aliajn tri lingvojn oni preskaŭ ne tradukis. Plej ofte la ĉeestantoj grupiĝis ĉirkaŭ la koncernaj tradukistoj de kelkaj pli fortaj landaj societoj de sciencaj laboristoj (kiuj konis la situacion kaj venis kun helpaj tradukistoj). Tie la tradukistoj sekvis nelaŭte la parolanton, tiom kiom ili povis, ofte mallongigante la frazojn, kaj aliaj aŭskultis — tiom kiom ili povis!

Pro tio estis sufiĉe konvinkiga la raporto de la reprezentanto de Internacia Scienca Asocio Esperantista, kiu (en la unua sekcio) tuŝis la problemon pri sciencaj revuoj en malgrandaj landoj. Li ne propagandis rekte por Esperanto. Sed li efike montris la neceson solvi, aŭ alme-

naŭ komenci solvadi, la lingvan problemon, ĝuste pro la scienca kunlaborado. Dum mallonga diskutado pri la problemo, la raportinto donis ankaŭ plurajn aliajn informojn pri la nuna utiligo de Esperanto sur scienca kampo, ĉar denove montriĝis ke multaj sciencistoj estas tre malmulte informitaj (eĉ misinformitaj) pri la internacia lingvo.

La intenco publikigi la plej gravajn raportojn

Multaj raportoj havus la intereson ankaŭ por la legantoj de Scienca Revuo, almenaŭ en mallongigita formo. Sed oni devus traduki ilin en Esperanton kaj la publikigo dependas plejparte de la bonvolemluloj pretaj traduki (en kompleta aŭ mallongigita formo), la raportojn. La plejparto de la manuskriptoj, kiujn la redakcio povas disponigi al ili, estas en angla lingvo; sekvas la rusa kaj iom la franca. Ni esperas ke almenaŭ por la plej gravaj raportoj anoncos sin la tradukontoj el tiuj tri lingvoj.

SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio

Esperantista, Vol. 19. n-ro 2 (1968)

05 (—77):001.4

SCIENCAJ REVUOJ EN MALGRANDAJ LANDOJ

(Raporto en la Internacia Konferenco «Kondiĉoj kaj eblicoj por scienca kunlaborado en Eŭropo», Vieno, 1968, Aprilo 16—19)

(Bož. Popović, Beograd, Jugoslavio)

Unu el la taskoj de la Mond-Federacio de Sciencaj Laboristoj, laŭ ĝia Statuto, estas »movigi antaŭen la internacian kunlaboradon en Scienco kaj Tekniko«, Sed »movigi antaŭen« klare signifas: eliminadi ĉiujn obstaklojn ĝenantajn internacian kunlaboradon, eliminadi ilin ne nur proklamante anatemon kontraŭ ilin, sed ankaŭ per ĉiutaga batalo kontraŭ ĉi tiuj obstakloj, la batalon instigantan novajn iniciatojn kiuj helpados ke la obstakloj malaperu.

Neniu aspekto de la malfacilaĵoj por la internacia kunlaborado estas malgrava, precipe se ĝi montriĝas en pluraj domenoj de la kunlaborado. Unu el tiaj aspektoj estas la problemo de la utiligata lingvo. Kia ajn estu la formo de la scienca internacia kunlaborado, certe oni renkontos — en tiu aŭ alia formo — la problemon de la utiligata lingvo.

Por esti konkreta, esploru »la eblecojn plilarĝigi scienca kunlaboradon al ĉiuj sciencaj revuoj« (el la programo de la Konferenco). Por trovi la vojojn por fruktodona plilarĝigo de la kunlaborado sur la kampo de sciencaj revuoj, ni devas unue esplori la aktualan staton de eŭropaj sciencaj revuoj, precipe en malgrandaj landoj.